

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Tonkin: Kulturo
de paco — ne
nur por elito**



**Komitato stiras al
nova laborplano**



**Jordanio:
Seminario vokas
al araba agado**



UK je krucvojo de kulturoj

Vi trovos

141 **Malferme**

Reviglu la fiero pri tradicio

Ulrich Lins

142 **Kongresa temo**

Kia kulturo? Kia paco? Kia lingvo?

Humphrey Tonkin

144 **Solena inaŭguro**

Kongresi en
la lando de
La espero

Salutoj de d-ro L.C.
Zaleski-Zamenhof
kaj de Kofi Annan

146 **Arabaj landoj**

Survoje en Mez-Oriento

Elisabeth Schwarzer

147 **Interlingvistiko**

"Forĝi vivantan lingvon"

Laŭ raporto de Humphrey Tonkin

148 **Komitato kaj Estraro**

Prepare al novaj gvidlinioj

Osmo Buller

Saluto de Koichiro Matsuura

149 **Strategia Forumo**

Por krei koheron

150 **Belantaj Konkursoj**

Eseoj kaj kantoj plej premiindaj

Artaj aranĝoj

Ili estis ĉi tie

Zagrebo teatris

151 **Infana kongreseto**

Nedensa abundo por infanoj

Stefan MacGill

152 **Kongresa kalejdoskopio**

154 **Solena fermo** 33 jarojn poste

156 **Sensi kaj senti tratempan Israelon**

István Ertl



Kaj plue...

157 **Laste aperis**

158 **Kongresa panoramo**

160 **Forpasoj**

La kovrilo: Kongresa halo
(F. Veuthey)

Dekstre: Ekrigardo al Tel-
Avivo (F. Veuthey)

ESPERANTO


Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establiĝita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informi-
gu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zappelli.



REVIGLU LA FIERO PRI TRADICIO

Maloŭte UK tiom ligiĝis kun historio kiel la Tel-Aviva. Jam unufoje tiu ĉi UK devis okazi, sed tion malhelpis la militeksplodo inter Israelo kaj ĝiaj arabaj najbaroj en 1967. Post longa hezito la Estraro de UEA kaj la landa asocio refoje decidis organizi kongreson en Tel-Avivo. La kuraĝecon de tiu decido ilustris la dumkongresa kolapso, espereble nur provizora, de la traktadoj inter Barak kaj Arafat en Camp David. La UK mem feliĉe pasis trankvile. Ni multon lernis pri la lando kaj la regiono, ankaŭ per la antaŭkongreso en Jordanio, kiu espereble malfermis vojon por pli da araboj al nia movado. Multaj kongresanoj, precipe dum ekskursoj, iom proksimiĝis al la fora tempo kiam ekĝermis la kristanismo, unu el la radikoj de nia civilizo.

Neeviteble ni sentis malharmonion inter la grandega problemaro mez-orienta kaj la povo de la e-istoj, kies lingvo povas nur et-paŝe kontribui al “kulturo de paco”. Ni iĝis pli realismaj ol pli fruaj generacioj esperantistaj.

Tia pli sobra rigardo tamen ne konvenas ĝuste rilate al la unua UK kiu okazis plene en juda ĉirkaŭaĵo. Ĝi forte konsciigas nin pri nia propra historio. Mi aludas unuavice la rilaton inter du klopodoj ambaŭ siamaniere celintaj solvi la “judan problemon”, nome kontraŭbatali la antijudismon. Temas pri la ideoj de Lazaro Zamenhof kaj Teodoro Herzl. La unua, “hebreo el la getto”, volis per Esperanto ebligi al la judoj – kaj kun

ili al ĉiuj homoj – eliron el diskriminacio kaj netoleremo; kaj Herzl, liberalulo el metropolo, propagandis revenon al Palestino, kreon de nova juda ŝtato. Proponoj tute malsamaj, sed motivoj similaj – tiom pli ke portempe ankaŭ Zamenhof aktivadis por setlado de judoj ekster Eŭropo. Estus fascine plu komparadi la du utopiojn. Se ni aldone esplorus ilian rilaton al la realo, ni eble atingus denove paralelajn konkludojn. Ne estiĝis la unuigita homaro pri kiu revis Zamenhof, nek plenumiĝis en Israelo la idealo de Herzl pri sekulara ŝtato.

Sed estas eco de utopioj ke ili ne plene realiĝas. Prefere ni prenu ilin kiel daŭran admonon. Pri Esperanto, ne necesas ripeti ke ne malaperis la kialoj de ĝia naskiĝo – en la mondo plue regas malamo bazita sur naciaj kaj religiaj diferencoj. Pri Israelo, ni eble rajtas esprimi la esperon ke tie ne forgesiĝos la kosmopolitismaj ideoj apartenantaj al la heredaĵo de Herzl.

Pli frue, la esperantistoj hezitis plene elstarigi la judmedian estiĝ-fonon de sia lingvo; multaj emis prisilenti la motivojn de Zamenhof (kaj eĉ li mem preferis kaŝi ilin). Tiu tabuemo hodiaŭ grandparte malaperis. Ĝi estus nun anakronisma. Kontraŭe, ni kun memfido apogu nin je historio kiu ne ĉesas instrui nin, interalie pri la utilo de utopioj. La kongreso en Israelo helpu revigligi nian fieron pri la tradicio de la Esperanto-movado.

Ulrich Lins

La tuta nocio ke unuopuloj povu organiziĝi por agadi internacie havas relative mallongan historion. Fakte, la Esperanto-movado estis unu el la unuaj tiaj paŝoj. Kvankam ja ekzistis interŝtataj aliancoj pli frue, nur en la dua duono de la 19-a jc. okazis iom sistemaj klopodoj krei internacian kunlaboron ĉirkaŭ internaciaj sistemoj — unue pri transporto kaj komunikado. Ĉiuj ĉi baziĝis sur la nocio ke la diversaj ŝtatoj, aŭ formalaj organizaĵoj ene de la ŝtatoj, inter si starigu kunlaboron. Sed ĉe Esperanto, individuoj faris kontakton kun individuoj en aliaj landoj simple por interkomunikiĝi kaj por ekkrei komunan grundon. De la komenco, Esperanto formis internacian kulturon, analogan al naciaj kulturoj, kaj serĉis inter la homoj komunajn valorojn. Ĝi estis profunde revolucia, kaj profunde minaca al la ekzistanta monda ordo.

Zamenhof mem rezistis la ideon ke oni formu formalajn organizaĵojn de esperantistoj, parte ĉar li estis rezista al la nocio de nur unu plia organiza strukturo, en kiu unu landa asocio traktas kun alia landa asocio kaj la individuo de unuopa persono iel perdiĝas en burokratio, kaj parte ĉar li ne deziris altiri sur sian lingvon la nedeziratan atenton de la instancoj.

Starigante sian lingvon, Zamenhof elektis la vojon de lingvo aposteriora, ne nur ĉar aliaj kreantoj de internaciaj lingvoj same agis en tiu epoko, sed ĉar li volis krei semantikan sistemon samtempe kun la leksika sistemo. La decido uzi la ĉefajn lingvojn de Eŭropo por la nova lingvo ebligis al Zamenhof transpreni la bazan semantikan sistemon de tiuj lingvoj. Tio donis malavantaĝon al ne-eŭropanoj, sed avantaĝon enorme grandan al Esperanto: artefaritan kulturan historion. Helpate de unika gramatika sistemo, iom konata semantika sistemo kaj komuna lingva historio (semantiko dependas de lingva historio: eĉ oni povus diri ke semantiko estas la historio de signifo), la unuaj parolantoj de Esperanto havis je sia dispono fundamentajn elementojn de komuna kulturo.

Turnante sin al hilelismo kaj homaranismo, Zamenhof klopodis iri pli profunden en la homa psiko. Se religio tiel fortas en la homa menso, ĉu ne eblus kunigi la ĉefajn komunajn elementojn en la religioj, ne por krei unu plian, sed por doni komunan spiritan bazon al la diversaj religioj? Homaranismo estis do plia paŝo laŭ la direkto de komuna kulturo.

Tiaj revoluciaj, eĉ utopiaj ideoj ne tiel plaĉis al la praktikaj francaj mezklasanoj, kiuj vidis en Esperanto ŝlosilon al internacia komercado kaj scienca kunlaboro. La fendo inter la mistikismo de Zamenhof kaj la praktikismo de Couturat kaj de Beaufront do montriĝis netranspontebla, kaj tiuj ideoj de d-ro Esperanto kiuj estis vere novaj, iel disipiĝis en la ordinaron de la Esperanto-movado kiu ekestis en postaj jaroj.

Kreante lingvon, do, Zamenhof ankaŭ kreis pensmanieron, en kiu gravis ĉefe (preskaŭ nure) la individuo: ĉe la kerno, ĉe la koro de Esperanto troviĝas du homoj, el diversaj landoj kaj lingvoj, en konversacio neŭtrala kaj egala.



Kia kulturo? Kia paco? Kia lingvo?


Al la kongresa temo, "Lingvo kaj kulturo"
Humphrey Tonkin kontribuis per jena poemo

Ĉio alia estas nur margena. Kaj notu ke mi parolas pri konversacio: ne sufiĉas paroli Esperanton, oni devas ankaŭ povi aŭskulti ĝin.

Esperanto celas krei kulturon de paco

Zamenhof estis 20 aŭ 30 jarojn antaŭ sia tempo kiel pensanto pri lingvistiko, sed 100 jarojn antaŭ sia tempo kiel pensanto pri internacia organiziĝo. Hodiaŭ la Tut-Tera Teksaĵo kreas porokazajn organizajn strukturojn kaj senperan komunikadon inter unuopuloj tiaspecajn kiajn Zamenhof iam imagis. Tamen, la ĉefa lingvo de TTT estas la angla lingvo. Ĝi fariĝis la ĉefa rimedo por disvastigi tiun pacan kulturon en kiu la interkomercado kaj la kreo de mondaj merkatoj fariĝis garantio de la paco. La angla estas la lingvo de la internacia elito, kiu profitas el tiu paca komerca kulturo. Kompreneble, la paca kulturo de Anglalingvio ja alportis amasajn avantaĝojn, sed ĝi havas du grandajn malavantaĝojn. Unue, ĝi pli kaj pli homogenigas la homojn. Normoj pri familia vivo, eduko de infanoj, praktikoj en la labormedio, manieroj utiligi sian liberan tempon — ĉio ĉi pli kaj pli samigas tra la mondo, kreante elitajn kulturon tiel fortan kiel la diversaj etnaj kulturoj. Farante tion (kaj jen mia dua punkto), Anglalingvio kvazaŭ forŝtelas la gvidajn talentojn de la unuopaj kulturoj kaj pligrandigas la fendon inter tiuj kiuj havas, kaj tiuj kiuj ne havas.

*redakcie mallongigita.



vo?
ro de paco",
orelego*.

Alternativo al homogenigo

Esperanto konsistigas alternativan kulturon, kiu havas certajn signifajn avantaĝojn. Unue, ĝi ne dependas de ekonomiaj faktoroj je sama grado kiel la angla. Kontraŭ la homogenigo, kiu estas kvazaŭ natura akompananto de la t.n. tutmondiĝo, ĝi potencie povas ŝirmi la diversecon de la kulturoj. Anstataŭ proteste akcepti la dominadon de la angla lingvo, indus ke la neanglalingvaj kulturoj trovu komunan rimedon — nome Esperanton — por doni voĉon al siaj kulturoj kaj por prezenti alternativon al la angla lingvo, tian alternativon al kiu, en ĝustaj cirkonstancoj, estus morale malfacile rezisti eĉ por anglalingvanoj. Tra la mondo nuntempe mortas lingvoj je granda rapideco; ofte mortas kun ili ankaŭ kulturoj. Iasence la perdo de lingvoj paralelas la perdon de biologiaj specioj: la rezulto estas mondo malpli preta fronti la nekonatan estontecon, ĉar malpli riĉa je alternativoj. Indas do trovi metodojn konservi kaj ŝirmi nian diversecon.

Kulturo de paco ne necesigas ke ni ĉiuj pensu same, sed ke ni ĉiuj respektu niajn diferencojn. Ni sukcesas plejparte evoluigi niajn rilatojn en la familio aŭ en niaj propraj komunumoj kun kompreno kaj sen perforto. La defio antaŭ ni estas fari samon je tutmonda nivelo.

Kreo de kulturo de paco necesigas akcepton de malsameco, de diferenco, sen la tento simple forfroti tiujn

diferencojn. Kiel kredantoj je la valoro de komuna lingvo, ni en multaj kazoj uzas tiun lingvon por transponti malsimilecojn kaj por kompreni ilin. Sen diferencoj, do en mondo sameca, eventuale tiun ponton ni ne bezonus — sed tiam mankus ankaŭ la riveroj en kiuj la potenco de la kultura diverseco fluas, kaj per kiuj la floroj kaj arboj de tiuj kulturoj estas nutrataj.

Dua avantaĝo de Esperanto estas ke ĝi ebligas multe pli profundan ekkonon de aliaj homoj kontraŭ simila elspezo de energio kaj tempo (la spiritaĵoj profitoj de utiligo de Esperanto estas tre altaj). Oni povas multon atingi per Esperanto sen granda investo. Indas aldoni ke Esperanto estas genia eltrovaĵo, kiu havas pli da elementoj komunaj al grandaj literaturaj verkoj aŭ al aliaj artaj ĉefverkoj ol al simpla praktika metodo de interkomunikado. Eble venis la tempo defendi Esperanton antaŭ la mondo ne per tio ke ĝi estas lingvo utila al la homo, sed ke ĝi estas poemo kiu ŝanĝas la mondkoncepton. Oni ofte diras ke Zamenhof estis poeto, sed oni ne konsekvence aplikas tiun ideon.

Nia menslarĝiga tasko

Sed ekzistas, potencie, tria signifa avantaĝo: Esperanto ne estas nepre ligita al tiu elita kulturo al kiu mi pli frue aludis. Ni povas per Esperanto konsciigi la mondon pri aliaj homtavoloj, pri aliaj aliroj al mondaj problemoj. La malfortiĝo de la ŝtato kondukis nian movadon al certa krizo pri direkto. Dum ni povis kolektive labori por sukcesi Esperanton ĉe UN, aŭ persvadi la instancojn enkonduki Esperanton en tiun aŭ alian medion, ni sciis kien iri. Hodiaŭ, tamen, la malnovaj metodoj kaj pensmanieroj ne plu estas adekvataj. Tiun mesaĝon laŭte kaj insiste liveradas homoj tiel malsimilaj kiel Mark Fettes kaj Giorgio Silfer, ĉiu laŭ sia maniero. La homoj kiuj insistas ke Esperanto estas kulturo, socio, komunumo, mia opinio pravas. Sed tio ne konduku al la kredo ke ni ekzistas por ekzisti, ke nia ĉefa zorgo estu uzi niajn rimedojn por ĝui tiujn rimedojn kaj pligrandigi ilin. Konduti tiel estas konduti kiel ŝtato en la unua duono de la 20-a jarcento. Nia tasko estu larĝigi la mensojn de la homoj, ŝanĝi la manieron laŭ kiu ili rigardas siajn homajn samspecianojn kaj krei, surbaze de la poezia forteco de Zamenhof kaj lia lingvo, inkluzivan aliron al la problemoj de nia epoko, en kiu neniuj homoj estu forgesata, neniuj homoj estu sen espero. Tio estas kulturo de paco.

Mallonge, do: Kia paco? Pli ol simple manko de milito. Kia kulturo? Pli ol simple aro da komunaj interesoj. Kia lingvo? Pli ol simpla limigita komunikrimedo.

Sed pliaj demandoj leviĝas el tiuj tri:

— Ĉu Esperanto estas aŭtentike alia ol aliaj lingvoj? Ĉu ĝi vere povas roli kiel lingvo de la paco?

— Se jes, ĉu ni devas ŝanĝi la metodojn kiujn ni uzas por utiligi kaj disvastigi Esperanton?

— Kiujn konkretajn paŝojn ni povas fari por plifortigi la rolon de Esperanto kiel lingvo de la paco?

— Kiun rolon ni povas ludi kiel privataj civitanoj en la lukto por pli justa mondo kaj la kreo de kulturo de paco?

— Kiel mastrumi mondon de multaj kulturoj kaj multaj lingvoj? ★

Kongresi en la lando de *La espero*

Podianoj de solenaj inaŭguroj de nun devos ne nur zorge pesi ĉiun vorton, sed ankaŭ aktore majstri sian vizaĝon — almenaŭ se, same kiel en la komenca solenaĵo de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, granda ekrano dismontros ilian figuron al la publiko.

Tiuj ĉ. 900 homoj kiuj — el 1212 kongresaj aliĝintoj el 61 landoj — ĉeestis en Salono Zamenhof, povis do tre bone vidi la podianojn: la Estraron de UEA (escepte de Tacuo Huĝimoto), la vicurbestron de Tel-Avivo—Jafo, Natan Wolloch; la prezidenton de la Akademio, Geraldo Mattos; la LKK-estron kaj samtempe rektoron de Internacia Kongresa Universitato, Amri Wandel; la ĝeneralan direktoron de UEA, Osmo Buller, kaj la reĝisoron de la kongresa temo, Boris Kolker.

Ĉeestis la inaŭguron la ambasadoroj de Ĉeĥio (Daniel Kumermann), Grekio (Jorgos Zomios), Kroatio (d-ro Svjetlan Berković) kaj Vatikano (apostola nuncio ĉefepiskopo Pietro Sambi), kaj aferŝarĝitoj de Finnlando, Hungario, Litovio, Nederlando kaj Slovakio.

Ne en la ombro de milito

En sia bonveniga saluto Amri Wandel memorigis ke jam en 1967 devus okazi UK en Tel-Avivo, sed milito tion mal-

ebligis; 33 jarojn poste, laŭ “kuraĝa decido de UEA”, efektive realiĝas Esperanta mondkongreso, “ĉi-foje ne en la ombro de milito sed kun la espero de pac-intertraktoj”.

Gbeglo Koffi voĉlegis saluton de Unesko (vidu p. 148), kaj Osmo Buller

improvisze elangligis freŝe faksitan saluton de la Ĝenerala Sekretario de UN, Kofi Annan. Ne necesis tamen traduki la lastan frazon. (Vidu dekstrapaĝe).

Post konigo de saluto de Amnon Lipkin-Shahak, turisma ministro kaj ano de la Honora Komitato, mal-

Saluton al vi, estimataj gesinjoroj, saluton al vi,

geamikoj, venintaj de tre diversaj, proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur nia terglobo, por kongresi, ĉe la sojlo de miljaroj, en la patrolando de popolo ene de kiu la Iniciatinto de nia Lingvo serĉis iam siajn antikvajn originojn.

Vi venis kongresi al la patrolando de Abrahamo, de Jakobo, de Moseo kaj de Kristo, sed ankaŭ patrolando de Hilelo, teologo vivinta tie antaŭ ĝuste du miljaroj, filozofo kies ideoj inspiris iamaniere la Zamenhofajn.

Vi venis al la sankta lando de tri grandaj religioj, lando de Dio, “kiun ĉiuj malsame prezentas, / sed ĉiuj egale en koro (Lin) sentas”.

Vi alvenis tien en la Jaro de Kulturo de Paco, do, laŭ la difino de Unesko, jaro de la kompreno, de la toleremo kaj de la solidareco inter la popoloj kaj inter iliaj kulturoj. Kulturo de Paco, signifanta kulturon de valoroj, de kondutoj gvidantaj senperforte al universala justeco, garantianta al ĉiu ajn la vivantan realecon de homaj rajtoj. Kulturo de Paco, kontraŭstaranta la minacon de pereco de la diverseco de nia spirita heredaĵo, kies postlaso ni ŝuldas al la estontaj generacioj.

Vi venis por debati la rolon de la lingvo ene de tiu kulturo de paco, debati la rolon de la lingvo kiel vehiklo de la kultura diverseco, diverseco prezentanta substancan faktoron de la spirita riĉeco de la homaro. Vi venis por debati la rolon de la lingvo neŭtrala, lingvo ne ambicianta anstataŭi iun ajn lingvon naciajn, ŝirmon de nacia kulturo, tamen, en sia rolo de lingvo internacia, kontribuanta al la kompreno kaj, pere de kompreno, al la toleremo de kulturo de la najbaro, lingvo servanta tiamaniere la ĉefajn faktorojn de la kulturo de paco. Ĉar nia lingvo neŭtrala portas en si implicite la Zamenhofan idealon de toleremo kaj de la amikeco, de la frateco interhoma. La vortoj de lia *Preĝo sub la Verda Standardo*: “kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj, / Antaŭen kun pacaj ariloj! / Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj, / Ni ĉiuj de Di estas filoj” — sonas tie ĉi ankoraŭ pli forte.

En la nomo de la familianoj Zamenhof mi deziras al la 85-a Universala Kongreso de Esperanto plenan sukceson kaj fortan eĥon tra la mondo, hodiaŭ, same kiel hieraŭ, kulturon de paco soifanta.

D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof



Fotoj: UEA / F. Veulhey



Supre (de md.): Kolker, Chrdle, Gbeglo, Lipari, Enderby, Buller, Wandel, Corsetti. Salutas (de md.) LEE Hak-Sun (Koreio), Johano Hammes (Sud-Afriko) kaj Libardo Mejia (Kolombio).

longan salutparoladon faris la kultura ataŝeo de la japana ambasado, Kunio Ishida. Vicurbestro Natan Wolloch laŭtlegis sian saluton en Esperanto. Li memorigis ke “la urbo Tel-Avivo naskiĝis antaŭ naŭdek jaroj, ne longan tempon post Esperanto”, kaj ke ĝi havas urbocentran straton nomitan laŭ d-ro Zamenhof, vaste konatan pro centra medicina instituto tie situanta.

Salutmesaĝon sendis prof. Naomi Ĥazan, vicprezidentino de la israela parlamento, kiu agnoskis la “fortan volon [de e-istoj] krei ponton trans la diferencoj naciaj kaj etnaj”, kaj Josi Sarid, eksministro pri kulturo, opinianta ke “la tuta mondo, inkluzive Israelon kaj Mez-Orienton, bezonas treege la lingvon Esperanto kaj la tiom gravan mesaĝon kiun ĝi disvastigas inter la homoj”.

La 26-a de julio estas la tago de la Unua Libro de Zamenhof, kiu aperis danke al subteno de la familio de lia edzino, Klara Zilbernik. Tial estis trafe, eĉ kortuŝe, ke aperis sur la kon-

Nome de la Monda Centro de la bahaa religio, salutis ties internacia konsiliano Hartmut Grossmann, kiu rememoris pri la vizitoj de Lidja Zamenhof al lia patro, la esperantista bahaano Hermann Grossmann.

Disvastigo: Ilo, ne celo

En sia malferma parolado, prezidanto Kep Enderby emfazis: “la fundamenta pravigo de niaj klopodoj, eĉ pli grava ol la disvastigo de Esperanto mem, estas la celo helpi plipacigi rilatojn inter diversaj popoloj de la mondo. Mi ne konsideras herezaĵo diri ke la disvastigo de Esperanto mem estas nur grava ilo por tion fari. Aspekti kiel utopiemaj idealistoj, pacamantoj al kiuj mankas praktikaj rimedoj, nepre ne sufiĉas. Ni devas salti kvalite el nia nuntempa situacio por atingi novan etapon en nia evoluo.”

Nome de SAT salutis Floréal Gabalda, esprimante la esperon ke la Strategia Forumo (vidu p. 149) in-

gresas podio la israelanoj Theodor kaj Uri Levite, nepo kaj pranepo de Rosalia Zilbernik, fratinino de Klara. Prezintinte ilin, Renato Corsetti laŭtlegis la tradician saluton de ilia fora parenco, Louis C. Zaleski-Zamenhof (vidu p. 144).

Michela Lipari raportis pri la UEA-seminario “Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj”, ĵus okazinta en la jordanio ĉefurbo Amano (vidu p. 146), kaj Boris Kolker enkondukis al la kongresa temo aludante al mondaj konfliktoj kiuj ofte radikas ankau en konflikto lingva.



Kun granda plezuro mi transdonas miajn plej varmajn bondezirojn al la 85-a Universala Kongreso de Esperanto.

La komenco de nova jarmilo donas al ni unikan okazon por pripensi nian komunan destinton, en momento kiam ni estas interkonectitaj kiel neniam antaŭe. La avantaĝoj de tutmondiĝo estas evidentaj: pli rapida kresko, pli alta vivnivelo, novaj ebloj. Tamen ekestis kontraŭaj reagoj, ĉar la distribuo de tiuj avantaĝoj estas tre malegala kaj ĉar la tutmondan merkaton ankoraŭ ne ankras reguloj sur bazo de komunaj sociaj celoj.

La aparta rolo de Unuiĝintaj Nacioj en la nova tutmonda erao devenas el tio ke same ĝia membraro kiel ĝiaj agadkampoj estas universalaj, kaj ke nia Ĉarto esprimas komunajn valorojn. Estas nia tasko certigi ke tutmondiĝo donu avantaĝojn ne nur al iuj sed al ĉiuj; ke paco kaj sekureco realiĝu ne nur por kelkaj sed ĝenerale; ke ebloj ekzistu ne nur por privilegiitoj sed por ĉiu homo ĉie. Pli ol iam ajn Unuiĝintaj Nacioj estas bezonataj por transporti diferencojn inter ŝtatoj rilate al potenco, kulturo, grandeco kaj interesoj — servante kiel la loko kie oni esprimas kaj antaŭenigas la aferon de komuna homeco.

Dum via kunesto en Tel-Avivo, memoru ke ĉiu el ni povas fari ion por ke nia unueca mondo estu pli bona loko, kaj ke ĉiu el ni havas la devon eluzi ĉiujn siajn eblojn. Unuiĝintaj Nacioj povas krei eblojn, sed ĝi ne povas devigi vin uzi ilin. Ĝi povas gardi pacon, sed ĝi ne povas devigi vin alproprigi ĝin. Ĝi povas helpi por trovi vojon al evoluo, sed ĝi ne povas sola laŭiri tiun vojon. Al vi, la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, apartenas la tasko “kapti la tagon” kaj pleje uzi, por la bono de plej multaj, la eblojn kiujn prezentas tiu ĉi nova epoko. *En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson.**

Kofi Annan,

Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

**Frazo Esperantlingva en la originalo.*

Sub energia reĝisorado de Edvige Tantin, sekvis salutoj de kongresanoj reprezentantaj kvindekda landoj, de Albanio kaj Aŭstralio tra Islando kaj Japanio ĝis Usono kaj Venezuelo.

La kantado de nia himno, “La espero”, duoble varmigis la korojn de la kongresanoj en lando kies nacia himno portas tute saman nomon. ★

Survoje en Mez-Oriento

Elisabeth Schwarzer:
Germanio

Al Amano, la ĉefurbo de la reĝlando Jordanio, venis e-istoĝ de Argentino ĝis Islando por ĉeesti la antaŭkongresan UEA-seminaron "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj" (22-23 jul.).

Por la novaj samideanoj el Mez-Oriento enestis enigarda fenestro al la Esperanta mondo. Surbaze de unujara Esperanta informkampanjo kaj lige al la unua UK en Mez-Oriento oportunis seminario kun novaj E-parolantoj kaj interesatoj, el kiuj pluraj havis internaciecan fonon.

Reĝa kulturdomo estis dum semajnfino perfekta seminariejo. Abundis klimato kaj lokoj. Dum la antaŭtagmezo de la sekva tago la seminario translokiĝis al hotelo de la oficiala antaŭkongreso ekskursi.

Fotoj: Ursula Niesert

Rezolucio de la 1-a Seminario por Arabaj Esperantistoj: Al-voko kaj pro-voko de Amano

Por plenumi la celojn de Esperanto necesas alfronti konfliktojn kaj antaŭjuĝojn kaj utiligi la lingvon por krei kondiĉojn de paco kaj kompreniĝo.

Tiucele ni, partoprenantoj de la 1-a Seminario por Arabaj Esperantistoj en Amano, Jordano, de la 22-a ĝis la 24-a de julio 2000, diskutinte pri la temo "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj", proponas al la membraro de UEA la jenajn realigindajn punktojn:

- 1) UEA okupiĝu pri disvastigo de Esperanto precipe en landoj kie ne ekzistas lokaj fortoj;
- 2) Niaj fortoj estas limigitaj, kaj sekve ni koncentru nian agadon ĉefe (kvankam ne ekskluzive) je unu-du el la arabaj landoj. Parto de nia celo estu krei en tiuj landoj arabajn esperantistojn kapablajn siavice disvastigi la lingvon en pliaj arabaj landoj;
- 3) Jordano kiel facile alirebla lando kun favoraj kondiĉoj estu unu el tiuj landoj;
- 4) Komencaj paŝoj estu:
 - a) pretigo de taŭgaj arablingvaj inform-materialoj;
 - b) organizado de kurso en Jordano por utiligo de lokaj fortoj kaj internacia helpo;
 - c) komunikado kun universitatoj en la koncernaj landoj cele al organizado de komunikreto kaj eventuale de kunveno de fakuloj pri lingvaj kaj kulturaj problemoj kun internacia partopreno por i.a. informi la fakulojn pri la valoro de Esperanto kiel universitata studobjekto;

ĉ) konsiladoj inter la Araba Komisiono de UEA kaj israelaj esperantistoj pri la maniero laŭ kiuj ili povus helpi en tiu ĉi iniciato.

Amano, la 24-an de julio 2000

Horloĝdirekte: Moskeo Reĝo Abdullah. Chaouachi (maldekstre) kun nargileo. Vizito al la urbocentro. Corsetti fumas — ĉi-foje akvopipon.



Ĉion komencis, per laŭbezona ĝenerala ekprezentado de Esperanto, Humphrey Tonkin — en sia gepatra angla lingvo. (Lingvaj demandoj ofte estas delikataj — en la oreloj de esperantistoj.) Fine ni aŭskultis origine araban prelegon de edukministro d-ro Faisal O. Al-Refouh, pri tutmondiĝo kaj kulturaj rilatoj inter arabaj landoj kaj la mondo — en anglalingva resumo, ĉar samtempa interpretado el la araba ne eblis. La diskuto fokusiĝis al la dilemo de konkurencaj kulturaj valoroj, ekz. universalismo fronte al lokaj kaj religiaj tradicioj.

Grava aktivulino en la UEA-komisiono pri arabaj landoj kaj preparinto de la seminario, Trude Sinno, bedaŭrinde mankis pro malsano. Ŝian skribitan superrigardon pri Esperanto en la araba mondo kolego voĉlegis. Okazis enkonduka sesio de la israel-devena kleriga programo Becavta por interkompreniĝo kaj demokratio. Kaptis la

atenton de E-interesatoj la komparo de Hugh Martin inter la araba kaj Esperanto. Per araba interpretado la amikoj de Esperanto vigle diskutis. Provokis sprite kaj saĝe prof. Tonkin per la demando “Kies tutmondiĝo?”, kaj li prezentis ĝin lige al fazoj de historia evoluo.

La deziron pri unua E-kurso en Amano pozitive respondis Atilio Orellana Rojas. Fiaskis la spontana plano de jordaniano ĉeesti la Tel-Avivan UK kaj precipe la Cseh-kurson — UEA-invito ne sufiĉis por ricevi vizon ene de 48 horoj. Survoje en Mez-Oriento ne ĉio jam facilas. Vane ni atendis alvenon de libanaj, israelaj kaj uzbekiaj aliĝintoj.

Simbole, nargileo — la temo kaj la objekto — arigis plej multajn partoprenantojn en rondon harmonian. La tunezia antropologo Kamal Chaouachi impone parolis unufoje en Esperanto prelegante pri ĝi. Praktikado per tiu pacpipo mezorienta sekvis vespere. Ne forgesblas al la esperantistoj diverslandaj la renkonto kun studento el Barejno, kiu bonege lernis Esperanton per la reto kaj unufoje ĝin parolis.

Alvoko el ŝlosila lando

Ni ĉeestis inspiran Esperantan seminarion en ŝlosila lando de la araba mondo. Kun granda sindediĉo preparis kaj kunordigis ĉion la estro de la UEA-komisiono por la arabaj landoj, d-ro Renato Corsetti. Kune kun d-ro Al-Refouh li estras la jordanian Gandhi-centron por strategiaj pac-studoj. Konklude la seminarianoj lanĉis “pro-vokon el Amano”. (Legu maldekstre.) Ĝi helpu strategie, organize kaj materie vigligi la intereson pri Esperanto en la araba mondo kaj pilargigi la E-oferton. En la tria jarmilo samideanoj en la arabaj landoj ja deziras kontakton kun la Esperanta mondo — des pli facile per Interreto.

Evidentiĝis ke ne temis pri la unua E-kunveno en araba lando. Pasintece jam aktivis e-istoj en ekz. Egiptio, Palestino kaj Libano. Tion poste aŭdis ekz. vizitantoj al familio de forpasinta Betlehema esperantisto, s-ro Anastas.

— p. 148

“Forĝi vivantan lingvon”

En la kolokvo “Forĝi vivantan lingvon” ĉe la Universitato de Tel-Avivo (31 julio), grupo de lingvistoj komparis la socilingvistikajn radikojn de la moderna hebrea lingvo kaj de Esperanto.

Sub aŭspicio de CED kaj de la lingvistika fako de la universitato, kunvenis israelaj profesoroj, i.a. Fred Landman, Susan Rothstein, Baruch Podolsky, Elena Dubnova, Vladimir Mesamed kaj Shlomo Izre’el, kun, flanke de CED, i.a. Iván Bujdosó, István Ertl, Christer Kiselman, Maŭro La Torre, Geraldo Mattos kaj Humphrey Tonkin.

La du lingvoj, la nov-hebrea kaj Esperanto, ekestis preskaŭ samtempe, sub impulso de du fortaj personecoj el simila kultura fono, Ben Yehuda kaj Zamenhof. Plie similas “la entuziasmo de pioniroj pri enkonduko de la ‘nova’ lingvo en la ĉiutagan vivon, kaj la gramatika ekvilibro en la du lingvoj inter striktaj gramatikaj reguloj kaj relativa anarkio” (Eldad Salzman).

En sia malferma prezento pri la ekesto kaj frua historio de E-o, Tonkin i.a. parolis pri la klopodo de Zamenhof kunigi la plej altajn pensojn de la homaro en filozofion kiu transpontu la homajn religiojn — universalisma impulso kiu trovas paralelojn en la novhebrea, same kiel la insista klopodo krei funkciantan parolkomunumon.

Prezentante pensojn “de poeto pli ol de profesoro”, Mattos interalie analizis kiel Esperanto forigas leksikajn deficitajn per kreo de neologismoj: je unu ekstremo, ĝi simple rekte pruntas el aliaj lingvoj; je alia ekstremo, ĝi uzas endogenajn, priskribajn tradukojn. Iuj konsideras Esperanton projekto (kaj do senfine tuŝebla), aliaj konsideras ĝin lingvo (kaj do blinde sekvenda). Lingvoj konsistas el strukturo kaj leksiko; ĉe Esperanto la unua estas (kaj estu) tre firma, dum la dua estas tre fleksa.

Studento Dror Kamir prezentis la situacion de la novhebrea lingvo, kiu apenaŭ havis denaskajn parolantojn antaŭ cent jaroj. Tiutempe gepatroj — motivite ĉefe de ideologio — insiste uzis la lingvon hejme, eĉ kiam ili havis saman denaskan lingvon, ekz. la jidan. La

infanoj siavice uzis la lingvon en lernejoj kaj inter si, tiel ke ekestis perinfana cirkvito, kiu korektis kaj plialtigis la kvaliton de la lingvouzo de la gepatroj. Tiutempe, la novhebrea estis kaj iagrade restas lingvo de infanoj. E-o, tamen, ŝajnas esti unuavice lingvo plenaĝula.

Prof. Podolsky, mem E-parolanto, listigis kelkajn paralelojn kaj kontrastojn inter Esperanto kaj la novhebrea:

— inverse al la kutima evoluo, ambaŭ komencis sian vivon kiel unuavice skribataj lingvoj;

— ambaŭ ekuziĝis plie pro ideologio ol pro rekta komunika bezono;

— eŭropa influo klare manifestiĝas en la leksikaj elementoj de la semida lingvo novhebrea, kaj, simile, la plej eŭropa elemento de E-o estas la leksika;

— ŝanĝoj en la novhebrea iras tre malrapide, kaj oni ne povas devigi novigojn — same kiel en Esperanto.

Ne surprize ke la diversaj rimarkigoj vekis foje tranĉajn, eĉ tradukist-paneajn malkonsentojn (oni uzis Esperanton kaj la anglan en la kolokvo). Ne ĉiuj konsentis ke ideologio estis la sola, aŭ eĉ la ĉefa forto en la frua evoluo de la novhebrea; ne ĉiuj konsentis ke la klasika hebrea estis tiel ekskluzive liturgia kaj neevoluinta; ne ĉiuj konsentis pri la semideco de la novhebrea. La aserto ke la novhebrea kaj Esperanto estas “infana” resp. “plenaĝula” lingvoj, produktis aparte viglajn interŝanĝojn, en kiu oni emfazis la fenomenon de denaskaj parolantoj de Esperanto kaj ties lingvoakiron. Oni konkludis ke estus aparte interese fari komparon inter la iama lernado de la novhebrea fare de pioniraj infanoj kaj la hodiaŭa akiro de E-o ĉe “denaskuloj”.

La kolokvo finiĝis per peto de prof. Tonkin al la partoprenantoj, stimuli plian studadon de la rilatoj inter la du lingvoj, eventuale pere de *Language Problems and Language Planning*, la revuo de CED.

Laŭ raporto de Humphrey Tonkin

Saluto de Unesko



Kun plezuro mi transdonas

korajn salutojn al la partoprenantoj kaj organizantoj de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Tel-Avivo sub la temo "Lingvo kaj la Kulturo de Paco". Efektive, Esperanto estas lingvo de paco, kreita por forgi kompreniĝon inter ĉiuj homoj.

Estas ege konvene diskuti pri "Lingvo kaj la Kulturo de Paco" en la jaro 2000, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Unesko vidas lingvon kiel vere la ĉefan rimedon de dialogo, kaj dialogo akcelas interkompreniĝon. Lernado de lingvoj, de lingvoj de aliaj popoloj kaj aliaj kulturoj, estas valora kontribuo al "la laboro por antaŭenigi reciprokajn konon kaj interkomprenon de popoloj", kiel difinas la bazajn celojn de Unesko ĝia konstitucio. Lingvolernado malfermas la pordojn de komunikado kun aliaj kaj prezentas ŝancojn krei novajn ligojn de interkompreno kaj amikeco. Jen ankaŭ la kialo pro kiu lastatempa rezolucio de Interparlamentara Unio alvokas la ŝtatojn kuraĝigi siajn civitanojn lerni lingvojn. Lingvoj, kiel vehikloj por paca rilato inter la nacioj de la mondo, estas instrumentoj de kulturo de paco nun, kiam tutmondiĝo mallongigas distancojn kaj pliefikigas komunikilojn.

Estas evidente ke por praktike realigi kulturon de paco bazitan sur respekto al la vivo kaj digno de ĉiu homo, sur senperforto, sur kultura diverseco kaj sur dialogo sen fanatikismo, lingvo estas unu el la plej taŭgaj iloj. La fakto ke la lingvo de tiu ĉi internacia kongreso estas Esperanto, atestas pri la bona volo de ĉiuj partoprenantoj el tiom da landoj kaj pri la forto de la Esperanto-movado, kiu ĉiam aktivis por starigi kontaktojn inter diversaj popoloj, kontribuante al internacia kompreniĝo kaj paco per forigo de lingvaj baroj.

Mi gratulas Universalan Esperanto-Asociacion pro tiu ĉi iniciato kaj, esperante ke la dialogo disvolvota ĉi tie helpas akceli la pacprocezon kaj amikajn rilatojn en tiu ĉi regiono, mi deziras al la Kongreso plenan sukceson.

Koichiro Matsuura,
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Komitato kaj Estraro

Prepare al novaj gvidlinioj

Osmo Buller

Finance sana kaj preta adopti novan laborplanon, nia asocio alfrontas kun sobra optimismo la jarmil-ŝanĝon.

Eĉe se la Tel-Aviva UK estis malmultnombra, en la Komitato de UEA ne mankis kvoruma nombro, t.e. minimume duono de la membroj. El la 80 membroj de nia parlamento almenaŭ parton de la kvar kunsidoj ĉeestis entute 52 komitatanoj kaj 3 observantoj (el 12).

Unu el la plej agrablaj taskoj de la Komitato estas akcepti novajn landajn asociojn (LA). Ĉi-foje tia decido ne okazis, kvankam ne mankis petoj. Nova estis tiu de Azerbajĝana E-Asocio, kiu tamen ankoraŭ ne povis esti akceptita pro neatingo de la minimumo de 25 membroj. Jam de kelkaj jaroj treniĝas la petoj de Kataluna E-Asocio, E-Asocio de la Serba Respubliko kaj Honkonga E-Asocio. Ĉar en la koncernaj landoj (resp. Hispanio, Bosnio-Hercegovino kaj Ĉinio) jam estas aliĝinta LA, laŭ la praktikata proceduro necesus ties konsento aŭ almenaŭ nekontraŭo pri akcepto de LA aganta en parto de la lando. Montrigis ke Ĉina E-Ligo povus konsenti pri la akcepto de Honkonga E-Asocio. Ĉar tamen simila preteco plu mankas ĉe la LA-oj de Hispanio kaj Bosnio-Hercegovino, oni preferis ankaŭ rilate Honkongon ne apliki la statutan eblon havi pli ol unu LA en sama lando. Anstataŭe oni taskis komisionon (Brian Moon kaj Renato Corsetti) ellabori ĝis la Zagreba UK proponon pri traktado de tiu problemoj ĝenerale kaj ne nur koncerne la tri nunajn kazojn.

Pli efika perado

Dum la traktado de la Estrara Raporto pri 1999 (jun., p. 107-115) multan atenton oni donis al la malkresko de la membraro, informado kaj eksteraj rilatoj. Kvankam precipe en okcident-

eŭropaj landoj la membraro malkreskis baze pro la ĝenerala malfortiĝo de la movado, tendenco kiu eble ne ŝanĝiĝos baldaŭ, pli efika reto de perantoj povus helpi. La deziro de la CO – jam delonge aprobita de la Estraro – "dun-



La Komitato kunsidas. Supre (de maldekstre) estraranoj Corsetti, Lipari kaj Chrdle.

gi" pli ol unu peranton en sama lando, ricevis ĉi-foje ĝeneralan apogon.

Sana financo

Ĉi-jare la nombro de individuaj membroj restos multe sub 7000, sed la varbadon por 2001 espereble helpos ke la eŭraj membrakotizoj ne plialtiĝos. Por iuj landoj la kotizoj malaltiĝos pro la malfortiĝo de eŭro. La inflacio pravigos 3-procentan kotiz-plialtigon, sed eblas rezigni pri ĝi pro pli bona financa stato de UEA – en 1999 la spezkonto estis ekvilibra unuafoje de post 1982 – kaj dank' al la kresko de precipe rentoenspezoj rezulte de la ĵusa donaco de € 900 000 de s-ro GOTOU Mituo. Sekve la Komitato povis akcepti la proponon de la Estraro buĝeti eksterajn € 6000 por edukado, € 5000 por informado kaj € 4000 por eksteraj rilatoj aldone al la rimedoj kiujn UEA jam direktas al tiuj kampoj el diversaj fondaĵoj.

de p. 146

De Amano ne estis tre longa vojo al sekva, unutaga UEA-seminario en unika vilaĝa klerigejo Pac-oazo. (Artikolo aperos en oktobro. — Red.) Ĉi-foje la arabaj karavananoj ne povis kunvojaĝi. ★

Nova laborplano diskutota

Post unujara preparado en komisiono la Komitato decidis transdoni al vasta publika diskuto malneton pri nova laborplano de UEA. Ĝis nun UEA la-



enkorpiĝi en ĝin kelkajn ideojn esprimatajn en la diskuto. (La fina teksto aperos en la oktobra numero.)

Por pli glataj elektoj

En Zagrebo la Komitato ankaŭ elektos novan Estraron. La lastaj du elektoj ricevis malplaĉan kromnuancon pro preskaŭ seneliraj sakstratoj, al kiuj kondukis tro detalaj kaj striktaj preskriboj de la elekta regularo. Post plurjara diskuto oni povis fine akcepti reviziitan regularon, kiu pli prudente difinas la procedurojn. La ŝlosila organo de la elektoj, la elektokomisiono (Roland Lindblom, Claude Nourmont, SYOZI Keikô), komencis sian laboron en Tel-Avivo i.a. sondante pri la preteco de la nunaj estraranoj rekandidatiĝi. Prezidanto Enderby, kies diplomatia kaj respektoveka gvidado cetere esence kontribuis al la harmonia etoso en la komitatokunsidoj, je ĉies bedaŭro anoncis ke li ne intencas rekandidatiĝi por dua periodo.

Dum la elekta regularo ĉefe koncernas nur komitatanojn, espereble multe pli grandnombraj estos tiuj

boris kadre de la Adelajda plano pri Kampanjo 2000, pri kies plenumo la komitatanoj estis relative kontentaj. La nova plano, almenaŭ en sia nuna stato, konsistas el tri tavoloj: komprenigi Esperanton (informado), paroligi Esperanton (instruado) kaj utiligi Esperanton (aplikado kaj internacia kunlaboro). Ĉiu tavolo kuŝas sur tri kolumnoj: profesiigo, plijunigo kaj internaciigo. El la baldaŭ lanĉota publika diskuto oni tiros konkludojn en seminario antaŭ la Zagreba UK, kun la celo en tiu UK aprobi definitivan version de la plano, kiu donos gvidliniojn al nia agado en la unuaj jaroj de la nova jarmilo.

Oni diskutis ankaŭ pri alia dokumento, nedisigeble ligita al la ĝenerala laborplano. Temas pri "Gvidlinioj por informado pri Esperanto", kiun la Komitato povis jam adopti, kvankam ĝi rajtigis la estraranon Kniivilä ankoraŭ

kiuj bezonos gvidon de alia nova regularo adoptita de la Komitato, tiu por internacia ekzameno pri instrukapablo de Esperanto. Instruado ja estas unu el la ĉeftavoloj de la pretigata laborplano, kaj ĝiaj plej gravaj kolonoj kompreneble estos kvalifikitaj instruistoj. Oni nomumis ankaŭ novan komisionon por la elementa kaj meza ekzamenoj, kun la usonanoj Duncan Charters kiel prezidanto kaj Bill Maxey kiel sekretario.

UK 2003 en Gotenburgo

Ankaŭ la Estraro kunsidis plurhore, okupiĝante ĉefe pri organizaj aferoj de la UK kaj prilaborado de temoj por la Komitato. Tamen, ĝi krome faris tre gravan decidon kun intereso por la tuta esperantistaro: ĝi elektis la svedan Gotenburgon kiel la urbon de la UK en 2003. ★

Por krei koheron

De Eŭropa Klubo ĝis Sennacieca Asocio Tutmonda, de E-Propaganda Asocio de Oomoto ĝis Monda Turismo, 43 organizaĵoj uzantaj Esperanton estis reprezentataj en la tria, kvarhora kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo.

La Forumo, lanĉita kadre de Kampanjo 2000, kunvenis unuafoje en 1998 (Montpeliera UK), kie la prelegoj (leĝblaj en la broŝuro *Ĉiuj kune*) havis ĝeneralan karakteron. En la dua kunsido (Berlino, 1999) la prelegantoj traktis la E-komunumon el la fak-direktoj scienca-kultura, industria-profesia kaj jura.

En Tel-Avivo, enkonduke prelegis Bernhard Westerhoff pri la strategio de la E-komunumo el vidpunkto de bahaano. Li evoluigis tezon jam skizitan en nia revuo ('98 feb., p. 24): nun, kiam la *interna* vivo de E-o de longe pruvis ĝian ĉiukampan funkci-kapablon, ni devas strategie koncentri ĉiujn niajn fortojn *eksteren*, al ĉiunivela konsciigo pri la lingvoproblemo, per sistema instigado de lingvopolitikaj diskutoj.

Aldonante sperton de profesia E-uzanto, Giuseppe Grattapaglia resumis la historion de la sukcesa uzado de E-o en reklamado, de 1964 ĝis 1978, ĉe la aŭtofirmo FIAT. Ursula Grattapaglia rakontis pri la utiligo de Esperanto ĉe la brazila edukejo Bona Espero.

La sekva, abunda diskutado montris ke longas la vojo ne nur ĝis kreo de kohera strategio por ekstera aktivado, sed eĉ ĝis la alprenado de starpunkto komuna al ĉiuj kaj do reprezentbla eksteren. Tamen, konsento ŝajnis regi almenaŭ pri la neceso altigi la nivelon de nia faka agado, ĉar nur profesia agado konvinkas profesiulojn.

La gvidinto de la kunsido, Petro Chrdele, fine invitis al kvara kunsido de la Forumo en la Zagreba UK, post preparo per reta diskuto. ★

**LA ĈI-JARA AGO-TAGO
OKAZOS LA 7-AN DE
OKTOBRO, SABATE.**

Eseoj kaj kantoj plej premiindaj

La jaro 2000 ne esceptis al la regulo ke la nombro de verkoj senditaj al la Belartaj Konkursoj de UEA rekte rilatas al la grandeco de la tiujara UK.

Post la kvante kaj kvalite bonrikoltaj jaroj Montpeliera kaj Berlina, respektive kun 118 kaj 102 konkursaĵoj, en la Tel-Aviva jaro la juĝantoj devis taksati entute 69 konkursaĵojn.

La premiisto aspektas nekutime. En poezio kaj prozo, la bazaj branĉoj de la Konkursoj, la ĵurito trovis nur po unu premiindan verkon, ambaŭ tamen meritajn por la unua premio. Aliflanke, en la esea kaj kanta branĉoj, kiuj en pasinteco ofte spertis jarojn kun neniu aŭ malmultaj premioj, la rezulto ĉi-foje estis rimarkinda. En la esea branĉo ĉiuj verkoj ricevis premion aŭ honoran mencion, kaj en la kantobranĉo la unua premio

estis asignita egale al du kantoj de sama aŭtoro.

La sola branĉo, kiu altiris pli da konkursaĵoj ol en la antaŭa jaro, estis

tiu de infanlibroj. Partoprenis 5 libroj eldonitaj en 1999. Tiu nombro ĝojigis la juĝantojn, el kiuj unu tamen domagis la nepremiitajn librojn, ĉar laŭ li en malpli abunda jaro pli malpli ĉiu el ili estus povinta gajni la premion.

Kvankam la premio “Nova Talento” ne es-

tis aljuĝita, ankaŭ en la ĉi-jara honorotabelo troviĝas aŭtoroj kiuj ne estis distingitaj antaŭe. Tamen ne ĉiuj el ili estas tute novaj talentoj: Mikaelo Gišpling, laŭreato de la unua premio en poezio, estas jam eldonita poeto (*El sisma zono*, Flandra E-Ligo, 1994).

Laŭ interkonsento kun UEA, la literatura revuo *Fonto* ankaŭ ĉi-jare aperigos la premiitajn verkojn. ★



Mikaelo Gišpling

UEA / Francjo Vauthier

Ili estis ĉi tie

UEA / Francjo Vauthier

Pli ol la tradicia “Nacia Vespere”, konvenis la nomo “Internacia Vespere” por la spektaklo de la folkloro trupo Anahnu Kan (“Ni estas ĉi tie”), kies dancoj kaj kantoj radikas jen en Hispanio, jen en Rusio kaj Litovio — kio ne mirindas en lando kun loĝantoj enmigrintaj el ĉiuj mondregionoj, kunportintaj siajn tradiciojn kaj kutimojn. La lertmovaj junaj dancistoj kaj beltembraj korusanoj de Anahnu Kan katenis la atenton de

Zagrebo teatris

Vidiga Vida en *La poto*

Pro la specifaĵoj de la Esperanta teatra arto, la Zagreba aktorino Vida Jerman estas “kondamnita” ludi en la internacia lingvo dramojn unupersonajn. Tio tamen ne malhelpis ŝin enkorpiĝi tutan aron da rolantoj, preskaŭ la kompletan loĝantaron de orient-eŭropa juda urbeto (*ŝtetl*) en la monologo *La poto*, verkita de Ŝalom Aleĥem en 1901. Laiko jam malfacile imagas kiel Jerman parkerigis la nehaltigeblan vortofluon de la vidva kokvendistino Jento, per kiu ŝi paralizas sian kunludanton (Ranko Stojić) en senparolan rolon de rabeno. Sed, preter la tasko lerni kaj tiel virtuoze



Vida Jerman

Rezulto de Belartaj Konkursoj de UEA 2000

POEZIO: Unua premio: Mikaelo Gišpling (Israelo) pro *Neĝa fantazio*. **Dua kaj tria premioj** ne aljuĝitaj. **Honoraj mencioj:** Stefan MacGill (Hungario) pro *Letere etere*, kaj Nikola Rašić (Nederlando) pro *Telefonvoko al postmoderno*. Partoprenis 40 verkoj de 17 aŭtoroj el 12 landoj.

PROZO: Unua premio: Júlia 'Sigmond (Rumanio) pro *Mi ne estas Mona Lisa*. **Dua kaj tria premioj** ne aljuĝitaj. **Honoraj mencioj:** Claude Schroeder (Francio) pro *Amletero* kaj Tibor Kristály (Hungario) pro *Leon-vilaĝo*. Partoprenis 11 verkoj de 8 aŭtoroj el 8 landoj.

TEATRAĴOJ: Neniu premio aljuĝita. Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro.

ESEO: “Premio Luigi Minnaja”: Sten Johansson (Svedio) pro *Kiel legi — ĉu legi — Stellan Engholm*. **Dua premio:** Nikola Rašić (Nederlando) pro *Digrafio: speciala kazo de*

rilato inter lingvo kaj skribo. **Tria premio:** Sten Johansson pro *Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999*. **Honora mencio:** Carmel Mallia (Malto) pro *La vojo*. Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

KANTO: Premio “Ahn Song-san pri Kanto”: Tarcísio Lima (Brazilo) pro *Diskanto kaj Ĉi-paĝa deziro*. **Dua premio:** Anja Karikainen kaj Vesa Pölkki (Finnlando; resp. teksto kaj muziko) pro *La koroj batu*. **Tria premio:** ne aljuĝita. Partoprenis 6 kantoj de 4 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 3 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 1999: *La avo en la ĉareto* de Gudrun Pausewang, tradukita el la germana kaj eldonita de Nora Caragea (Germanio). Partoprenis 5 libroj de 5 eldonoj el 5 landoj.

VIDBENDO: Neniu premio aljuĝita. Partoprenis 2 konkursaĵoj.


Nedensa abundo por infanoj

Karesi mustelon en la besto-angulo de la junulara vilaĝo Hadassim estis nur unu el abundo da aktivaĵoj de la Internacia Infana Kongreseto (IIK), sub la prizorgo precipe de Ankica Jagnjić kaj Stefan MacGill. Krome, ili pretigis kolĉenojn el bakitaj bidoj, plektis pojnrubandojn, farbis tolaĵojn kaj naĝis praktike ĉiutage — foje mare, foje akvo-parke, ofte basene. Ekskurse ili vizitis la UK-on ĉe Tago de la Lernejo de ILEI, vizitis bazaron en Tel-Avivo, kaj boatiris el la haveno de Jafo.

Unu grupo image planis magazenon kaj kreis afiŝon por reklami ĝin. Pli instige estis verki kaj aktori televidan reklamon por ĝi, ĉar tio estis vere registrita kaj je ĉies amuzo spektita. Vizito al la vilaĝa komputejo permesis esploron tra la ĉambroj de la kvazaŭa lernejo Tibor Sekelj (<http://lps.uniroma3.it/kler>). Trezor-serĉa ludo kurigis ilin.

En adiaŭa koncerto sur herbejo, Zsuzsa, Krisztina kaj Anabella (maldekstre ĉe la mustelo) bele kantis; kun Csaba, la kvara el Rumanio, ili ŝkeĉis;

Julia el Japanio flutludis, Elizabeto el Germanio kantigis ganto-pupegon Hugo. Ne eblas mencii ĉiun — sed ĉiu tra la semajno aktive kontribuis kaj partoprenis.



Komplezo de Stefan MacGill

Malgraŭ tiu abundo, la programo restis intence nedensa, por ke la dudeko da (eks)infanoj, aĝe de 6 ĝis 16, libere kunludu kaj amikiĝu. Pli da fotoj kaj raportoj pri la IIK aperos en ĝia hejmapaĝo, alirebla tra tiu de UEA (<http://www.uea.org>), sub “Servoj/Kongresoj”, aŭ ĉe http://www.geocities.com/amik99_1999. Haveblas jam informilo kaj aligilo por la sekva IIK en Zagrebo, kun aparte favora aligkotizo valida ĝis la 30-a de septembro.

Stefan MacGill • Hungario

saloneg-pleno da kongresanoj, same kiel ĝiaj du soloaj gekantistoj Ilana Kalman kaj Uri Avramoviĉ. Alternis melodioj tutmonde konataj kun muzikeroj judaj kaj jidaj; ni estis eĉ komplezitaj, pli ol unu fojon, per E-lingva kantado. Kvankam iuj en la publiko ne juĝis kongrua kun la kongresa temo dancojn en militista kostumo, la spektantoj entuziasmis kaj, post du horoj da movoj kaj melodioj, nur hezite disiris post unu sola biso.

ie

elbuŝigi (eĉ kun karakterizaj akĉentoj) la tekston, al Vida Jerman prosperis vidige aperiĝi sur la scenejo defian defilon da malsamkarakteraj personoj kaj sinsekvon da scenoj el la kokvendistina vivo. Plia omaĝo al la loko kaj tempo kie nia lingvo naskiĝis, la dufoje prezentita teatraĵeto estis merite kronita de varmaj aplaŭdoj de la fidela publiko.

La ŝtelita letero ne retrovita

Estas riska entrepreno teatri eksperimentaĵon por Esperanta publiko, pro ties kompreno neeviteble malplia ol ĝi estus en gepatra lingvo. Eble tion ne plene konsciis la kuraĝaj geaktoroj de Studenta E-klubo el Zagrebo, kiam ili muntis sian mult-rimedan spektaklon laŭ la novelo *La ŝtelita letero* de Edgar Allan Poe. Malgraŭ ideoplena utiligo de

filmeroj, ombroj kaj projekciaĵoj, ne ŝekvi la turnigojn de la intrigo. Sed, ĉiuj en la fluktua publiko sukcesis eble, tio eĉ ne estis la intenco. *ie*

Infana kongreseto 2001

Se la antaŭa IIK estis de maro kaj naĝoj, la sekva en Zagrebo (21-28 julio 2001) estos de arboj kaj grimpoj. La renovigita kongresejo Grad Mladih (“urbo de gejunuloj”) situas sur monto-flanko, kaj tamen, ene de la urbaj limoj de Zagrebo, atingebla en 30 minutoj de la centro. La programo disvolviĝos sub prizorgo de profesiaj gvidantoj. Pro la proksimeco, ambaŭdirektaj vizitoj inter la IIK kaj la UK estas planataj.

Bonvenas infanoj kapablaj kaj pretaj paroli Esperanton, inter 6- kaj 13-jaraj, egale ĉu la gepatroj partoprenos aŭ ne en la UK. Petu aligilon por kondiĉoj kaj organizaj informoj de la komisiito: Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ✉ stefan.macgill@galamb.net.

La aliĝo kovras kostojn de loĝigo, manĝoj, transporto kaj ekskursoj: ĝis 30 sept. 109 EUR; ĝis 31 dec. 129 EUR, poste pli. Rabato de 15% por dua infano samfamilia.

Lingvokursoj:**Espreso eksprese**

La kurseto "Hebrea eksprese" de Eldad Salzman tiel popularis ke fine necesis formi du grupojn. Li instruis ankaŭ la araban eksprese. Ĉar en la kongreseja kafejo deĵoris kaj judaj kaj arabaj israelanoj, anoj de ambaŭ kursetoj povis uzi sian scion por mendi kafon "espresan" en ambaŭ lingvoj.

Ĥoro: Solvo en lasta horo

La dirigento de la Internacia Ĥoro, Dimitar Terziev, ne sukcesis alveni el Bulgario. Ja la lasta minuto, do, Elena Puhova (Rusio-Ĉeĥio) kaj Tova Ben-Cvi (Israelo) transprenis la takto-bastoneton kaj gvidis la ĥoranojn al sukcesa prezento en la Internacia Arta Vespero.

KONGRESA KALEJDOSKOPO

Akceptoj: En Jerusalemo kaj Tel-Avivo

La 23-an de julio la vicprezidentino de la israela parlamento (*Kneset*, Jerusalemo), Naomi Chazan, oficiale akceptis grupon de 30 esperantistoj en la parlamentejo. De dekstre: starantaj Naomi Chazan, Yu Tao (Ĉina E-Ligo) kaj Michael Karpati, kiu organizis la akcepton kaj interpretis dum ĝi; sidantaj UEA-prezidanto Kep Enderby kaj HANG Jun (Ĉina Radio Internacia).

Sep tagojn poste, 160 kongresanoj estis invititaj al luksa akcepto ĉe Ron Ĥuldai, urbestro de Tel-Avivo-Jafo. Ĥuldai dubis ĉu oni bezonas internacian lingvon krom la angla, sed tuj aldonis ke li kredas pri la sukceso de la e-istoj, ja fervoraj kaj persistaj. Dankante, Kep Enderby donacis al li stakon da libroj: la urbestro, antaŭe gimnaziestro, demandis ĉu li estos ekzamenita pri la enhavo.

La UK informade: Tagon post tago

15 julio: LKK-ano Doron Modan parolas kelkminute pri la UK en

nokta magazino de la plej aŭskultata radio-kanalo, **16 julio:** Vespere IBA Radio Jerusalemo dissendas ĉ. kvaronhoran programon pri Zamenhof kaj E-o.

22 julio, kun ripeto la 29-an (sabataj vesperoj): Josef Semer malstreĉe konversacias (50 min.) pri Esperanto, kun muzikaj ilustraĵoj, en tutlanda radio.

25 julio: Matena radioprogramo kun Tali Wandel, 16-jara denaska esperantistino, kaj lingvisto prof. Baruch Podolsky, E-konanto. Al la abrupta demando "Kial Esperanto mortis?" Podolsky respondas: "Ĝi ne mortis; ĝi esti murdita de Hitler kaj Stalin."

25 julio: La alia filino Wandel, Maja, mallonge aperas en tre spektata televid-programo, "La nova mateno".

26 julio: La patro Wandel, Amri, anoncas en radio pri la UK en 20 sekundoj ĉirkaŭ 7h00, kiam milionoj aŭskultas

26 julio: La ruslingva *Kalejdoskop* de nacia televidkanalo elsendas intervjuon, proze kaj kante, kun la ruslanda artisto Moissej Bronŝtejn kaj la armena esperantistino Knarik Davtjan.

5 aŭg.: Ĉ. miliono da spektantoj povia vidi en sabat-vespera elsendo 8-minutan raporton pri la UK. (Vidu "Televido" dekstraĵe.)

6 aŭg.: En la brazila ĵurnalo *O Povo de Fortaleza*, el la urbo de nia estonta UK en 2002, longe artikolas pri la Tel-Aviva UK partopreninto Socorro Acioli, studentino pri komunikado kaj LKK-ano de la 87-a UK.

17 aŭg.: Dupaĝa kolora artikolo en la plej populara junulara revuo israela, *Maariv Lanoar*, pri la Infana Kongreseto — krome, viva radio-intervjuo (40 min.) kun kongresetanoj, kaj intervjuo kun Maja Wandel en la infana kanalo de la israela televido.

Ĉiutage dum la UK, la plej granda kroata gazeto, *Večernji list*, informadas pri ĝi laŭ raportoj de Judita Rey-Hudeček.

.... Kaj nia listeto estas nek kompleta nek finita!

Bankedo: Subita dancigo

"La orkestro tiel bone muzikis ke homoj kiuj intencis nur iom flari la etoson subite troviĝis inter la dancantoj" — raportis la kongresa kuriero. La kantisto Uri Rabinoviĉ, aplaudita dum la nacia vespero, surprize revenis por denove kanti en la jida.

**Oomoto: Vi-dinda religio**

Inter plej diversaj Esperanto-asocioj, ankaŭ anoj de la japana religio Oomoto konigis sin ĉe stando. En ĝia kunsido ducento da kongresanoj povis gustumi japanan verdan teon, post i.a. aikido-prezentado kaj kongrestema prelego de TABUĈI Jasuo.



Judoj: Kio estas tio?

La prelegoj pri judoj en rusa poezio (Moissej Bronŝtejn), kaj juda humuro (Anat Zajdman) — du el kvin “Prelegoj pri Israelo” — estis iusence subfositaj de Josef Ŝemer (“Kio kaj kiu estas judo?”), ĉar post lia prelego, kvankam tre klara kaj klariga, neniuj plu sciis kio kaj kiu do estas judo. Ŝemer estis do plu siegata per amasoj da demandoj ekster la prelegejo.




Televido: “Grandioza revo”

Ĉ. miliono da spektantoj povis vidi la 5-an de aŭg., en sabat-vespera elsendo, 8-minutan raporton pri la UK. Mozaiko zorge elektita el materialo filmita dum pli ol kvin horoj montris viglajn scenojn el la aŭkcio, la internacia vespero, konversacia rondo ktp. Konservigis la Esperanta parolo, kun subtitoloj hebreaj. La raporto konkludis — post la kanto “Se mi estus riĉa...” prezentita de Vida Jerman — ke “Esperanto eble ne estas tre enspeziga negoco, sed jes ja grandioza revo”.

Kuriero: Pleadin KKKK?

Laŭ la Tel-Aviva slogano “Urbo senpaŭza”, la kongresa kuriero nomiĝis *Stel-Avivo senpaŭze*. Efike kaj trafe redaktis ĝin — kun helpo de la lokaj volontuloj Cvi Ŝolt kaj Aleks Kerbel — kroato, Josef Pleadin. Li jam nun cerbumas sub kia titolo redakti la kurieron venontjare, en sia hejmlando. Ĉu redaktoro Pleadin iĝos Konstanta Kongres-Kuriera Komisiito?



en la tombo — mi en la salono certe.) Jen nepra pripen-sindaĵo, kaj instigo por ni ĉiuj. (*Cristina de' Giorgi*)

Salonnomoj: Kato en la sako

Samtage kaj -hore kunvenis, en la salono Maschler, komunistoj, kaj en la salono Dratwer, kat-ŝatantoj. Josef Ŝemer, kiu konis s-anojn Henryk Maschler (1908-91) kaj Isaj Dratwer (1905-85), rakontis ridete ke ĝuste Dratwer ne ŝatis katojn, dum Maschler ege amis ilin kaj eĉ havis kelkajn. Pri komunismo Maschler esprimiĝis per satira libreto: *La necenzurita humuro*, 1968. Tie pri komunismo kaj katoj ni legas jenan dialogon (p. 72): “— Nia katino naskis tri belajn katidojn, sed ili jam ne estas komunistoj. — Kial jam ne estas? — Ĉar ili jam intertempe malfermis la okulojn.”

Fake, loke, jarkunvene

Amikaro de E-o en Radio: Kunvenis aŭskultantoj kaj redaktoroj de radio-stacioj, i.a. el Varsovio, Pekino kaj Havano. Oni konstatis ke vera internacieco nuntempe signifas orientiĝon al Interreto.

Ateista Tutmonda E-Organizo: Laŭ la provizora estraro de la reviviganta asocio (Claude Nourmont, Helga Rapley, Dieter Rooke, Jesús de las Heras, Anna Löwenstein), ATEO ne estas kontraŭ religioj,

sed ja kontraŭ la premoj de religioj en la socia vivo.

Universala Medicina E-Asocio (UMEA): La ĉi-jaran UMEA-Shinoda-Premion ricevis s-ino GU Jian-hua (Ĉinio) pro sia *Ĉina-Esperanta-angla-franca ĉinmedicina terminaro*.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (<http://www.ikef.org>) decidis daŭrigi sian laborplanon 1998-2000 ĝis 2003. Okazis vizito al ESHED, firmao produktanta alt-teknologiajn sistemojn.

Kristana E-Ligo Internacia: Puramo Chong prelegis pri la situacio de kristanismo en Koreio suda kaj norda.

Internacia Scienca Asocio E-ista: Nova estraro (2000-2002) konsistas el prof. d-ro Heiner Eichner, prof. Ottó Haszpra, d-ro SUGANO Takeo, d-ro Martin Weichert kaj prof. d-ro Rüdiger Sachs, prezidanto. ISAE strebas i.a. al larĝskala kunlaboro terminologia kaj al pli da faka interŝanĝo kun UMEA.

E-lingva Verkista Asocio: Daŭras la enketo pri la “plej indaj verkoj el la E-literaturo” (vidu marto, p. 45); ĝis nun plej multajn voĉojn (po 11) ricevis *Kiel akvo de l' rivero* de Schwartz kaj *Ombro sur interna pejzaĝo* de Ŝtimec. EVA planas realigi, dum la Zagreba UK, 20-minutajn profesiajn film-portretojn pri E-verkistoj.

Tempotrako: Unuafoje en UK, Margareta Bettmann prezentis sian terapion por liberiĝi de antaŭnaske spertitaj ŝokoj kaj traŭmatoj.



33 jarojn poste

Nova vizaĝo inter la podianoj estis YU Tao (Ĉinio), kiu salutis nome de TEJO, kongresonta de 5 aŭg. en Honkongo. Li rimarkigis ke en 1986 nia UK okazis en Ĉinio kaj IJK en Israelo; en 2000 ĝuste inverse. (Por arkivemuloj: 1969 kaj 1980 estas alia ekzemplo de tia "historia inverso".)

Michela Lipari ĝenerale raportis pri la kongreso, kiu havis malpli da programeroj ol kutime — tamen, sufiĉe por foje krei embarason de elekto, kaj pli ol ĉi tiu nia numero povas kroniki.

Osmo Buller konigis la rezultojn de Belartaj Konkursoj (p. 150). Petro Chrdle raportis pri la Strategia Forumo (p. 149). Boris Kolker rakontis ke dum la kvar prelegoj pri la kongresa temo (Humphrey Tonkin, Amri Wandel, Christer Kiselman, Alex Karkovsky) la sidlokoj ne ĉiam sufiĉis por la interesatoj.

Renato Corsetti laŭtlegis la Kongresan Rezolucion (vidu sube).

Kalle Kniivilä anoncis la nomojn de la novaj Honoraj Membroj: biografioj de Juan Bachrich (Venezuelo), Elvira Fontes (Brazilo), Edwin de Kock (Sud-Afriko/Usono) kaj Sija van Wijngaarden (Nederlando) aperos en oktobro. Pri Premio Deguĉi, Subvencio Cigno kaj Fondaĵo Grabowski vidu ĉi-apude.

Pasiginte viglan semajnon en la junulara vilaĝo Hadassim (p. 151), 14 infanoj transdonis ereton de tiu etoso per tri gajaj kantoj.

Kiel estro de LKK, Amri Wandel enmanigis la kongresan flagon al siaj venontjaraj samsortanoj kroataj.

Kep Enderby anoncis sian "lastan solenan ferman paroladon" — li ja ne rekandidatiĝos por la Estraro venontjare. La esenco de lia mesaĝo estis ke, same kiel niaj UK-oj okazas ne en vakuo, sed en konkretaj loko kaj tempo, tiel same la e-istoj ne rajtas ignori la problemojn de la socio en kiu ili vivas.

Premio Deguĉi

Fondita en 1987 per kapitalo donacita de la japana religia movado Oomoto, Premio Onisaburo Deguĉi de UEA estas ĉiujare aljuĝata al individuo aŭ organizaĵo kiu agadas per Esperanto por internacia amikeco kaj solidareco. Je la 14-a fojo, la premio (diplomo kaj 2000 eŭroj) iris al **Rob Moerbeek** (Nederlando), pro lia longtempa helpado al triamondaj e-istoj kaj handikapitoj, precipe blinduloj. Dum multaj jaroj li kunagadis kun la edzino Nora, forpasinta en 1998, konata blindula aktivulino. (Rob Moerbeek jam de 1969 laboras en la Centra Oficejo de UEA.)



Ankaŭ Zamenhof ja ne "intencis limigi sin al la lingva problemo". Enderby

Kongresa Rezolucio

La 85-a Universala Kongreso de Esperanto,

kunveninta en Tel-Avivo, Israelo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2000, kun 1212 partoprenantoj el 61 landoj,

deklaras ke

— en tiu ĉi Internacia Jaro por la Kulturo de Paco necesas refortigi la tutmondajn klopodojn trovi komunajn kulturajn valorojn kaj interkonsentojn cele al konstruo de tutmonda Kulturo de Paco;

— tio ĉi okazos nur se en la mensoj de la homoj ni komune kreos tiun kulturon, ĉar daŭra paco estas konstruata nur en la mensoj de homoj;

— en tiu ĉi mondoparto, la Meza Oriento, kie kunvenas malsamaj kulturoj, kaj kie riĉa historio samtempe unuigas kaj dividas homojn, apartaj streboj estas bezonataj kaj jam farataj en serĉado de paco;

— kondiĉo por paco estas la respekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj inkluzive de la lingvaj rajtoj de ĉiuj konfliktantaj grupoj;

— la internacia lingvo Esperanto estas kreita ĝuste por ebligi kulturon de paco inter mal-

samaj gentoj, kaj pro sia neŭtraleco kaj pro sia rekono de la digno kaj samvaloro de ĉiuj homgrupoj ĝi donas grundon, sur kiu valoroj de paco povas flori;

alvokas

ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn:

— ke ili decide ekrespektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenu la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo;

deklaras

la pretecon de la Esperanto-movado:

— plulabori por kulturo de paco en la mondo surbaze de reciproka respekto kaj egalvaloro de ĉiuj gentoj kaj homgrupoj grandaj kaj malgrandaj;

— agi ĉie, kie paco estas minacata, apoge al la ceteraj klopodoj de la internacia komunumo;

esprimas

— sian admiron kaj subtenon al la klopodoj de ĉi tiu regiono, kiuj laboras por krei la eblecon de kulturo de paco, kiu estas antaŭkondiĉo por alveni al situacio de paca kunvivado kaj de respekto ambaŭflanka de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.



Foto: UEA/F.L. Verdier



Dankon al LKK: la israela movado montris sian organizan forton. Supre: Rob Moerbeek premiita.

revekis la ekzemplan memoron de s-ano Israel Lejzerowicz (1901-1942), kiu avertis frue, tuj ĉe la ekleviĝo de naziismo, pri la danĝeroj de troa neŭtraleco. En la konfliktoj hodiaŭaj, UEA ne povas alianciĝi kun unu flanko, sed, ene de la statutaj limoj, ĝi “ne ignoru sociajn problemojn, aparte kiam ili devige enplektas nin en niajn proprajn aliajn

statute devigatajn agojn kaj laborojn”.

Fine, Enderby ricevis aplaudan akcepton de la publiko por sia gratulmesaĝo sendota al Moshe Katsav, ano de la Honora Komitato de la UK, kiu estis la 31-an de jul. elektita kiel prezidento de Israelo — kun eta marĝeno super la alia kandidato, nia Alta Protektanto Shimon Peres. La mesaĝo memorigis pri la persona kontribuo de Katsav “al la decido okazigi la Kongreson en Israelo”, kiel turisma ministro (li akceptis en 1997 la ĝeneralan direktoron de UEA), kaj deziris sukceson por lia “intenco esti prezidento de ĉiuj israelaj civitanoj, preter diferencoj de gento, religio kaj politikaj opinioj”, progresante “sur la malfacila vojo al paco”.

En historia parentezo, ĉiuj aliĝintoj al la UK en 1967 (okazinta en Israelo) levis la manojn, kaj la tiama Konstanta Kongresa Sekretario, Glauco Pompilio, venis scenejen. Lia apero preludis al tuta invadeto fare de la LKK kaj ties helpantaro, kiuj ricevis meritan dankon: relative malgranda landa movado pruvis sian organiz-forton. Ĉe la dankado, ne estis forgesitaj la bahaanoj kaj kroatoj kiuj kompletigis la helptrupojn.

Nia milvoĉe kantita himno signis la finon de ĉi tiu kongreso — sed kelkaj

Fondaĵo Grabowski

Kreita en 1988 surbaze de donaco de Adam Goralski, Fondaĵo Grabowski subtenas la tutmondan Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. Ĉi-jare ĝia juĝokomisiono (Ulrich Lins, Aldo de' Giorgi, MINE Yosataka), aljuĝis premiojn de

— 700 usonaj dolaroj al **André Cherpillod** (Francio), akademiano, “pro lia mirige varia verka kaj eldona agado”, de ĉ. 30 verkoj kiuj “atestas pri impona erudicio”;

— 300 usonaj dolaroj al **Georgo Abraham** (Argentino), unuavice pro lia *Klara vortaro Esperanta-araba* (UEA, 1998);

— 150 usonaj dolaroj al prof. **Cho Sung-ho** (Koreio), precipe pro lia kontribuo al la faka E-literaturo per traduko de *La bildstria gvido al genetiko*.

Subvenciojn, asignitajn el la rento de la kapitalo, ricevas **Ada Csiszár** (Hungario), pro siaj zorge kompilitaj kajeroj *Omaĝe al Kálmán Kalocsay*, kaj **Maria Abolskaja** (Rusio), pro la broŝuro *Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo* (Memorlibro pri aktoro Nikolaj Rytkov).

jam havis enmane sian aliĝilon al la UK en Zagrebo. ★

Subvencio Cigno

Ekde 1994 la Estraro de UEA asignas Subvencion Cigno al projekto kiu kontribuas al disvastiĝo de Esperanto en la tria mondo aŭ Orienta Eŭropo. Tiun subvencion de 500 000 japanaj enoj (ĉ. 4900 eŭroj), financatan de la japana esperantisto Etsuo Miyoshi, ricevis **la projekto Indiĝenaj Dialogoj**, kiun antaŭ du jaroj iniciatis ges-roj **Bessie Schadee** kaj **Sylvain Lelarge** (Nederlando) por krei komunikanton inter organizaĵoj de indiĝenaj popoloj per la uzo de Interreto kaj Esperanto. Ĉe tiu ĉi projekto la disvastigo de Esperanto ne estas celo, sed rimedo por realigi la celatan komunikanton. Kadre de la projekto okazis jam du kursoj en Nederlando kaj po unu kurso en Barato, Kostariko, Burkina Faso kaj Komilando (Rusio).

Sensi kaj senti tratempan Israelon

Vi sciis ke vi venos al lando de antikvo, de malnovo kiun moderno apudas kaj kunas. Tamen, necesas la ekstertempaj gestoj de preĝantoj Jerusalemaj, de nargile-fumantoj, de bazaraj marĉandantoj kaj eĉ bilet-vendantaj busŝoforoj por konfirme konsciigi al vi la antaŭscion. Ĉi-lande la historio, tiu kun majusklo, enestas ne nur la memoron, sed ankaŭ la ĉiutagon. Konversacioj malofte limiĝas al vetero kaj cetero; eĉ turisto kelktaga sentas ke Israelo havas kelkajn dimensiojn pliajn ol tiuj de buntaj poŝtkartoj.

Kiom da Israelo kapteblas per la sensoj? Brula suno kaj onda maro sur via haŭto, spicoj de melongena salato kaj dolĉo baklavaa* sur via lango; la nazo signalas neglektitajn rubosakojn ĉe trotuaroj, sed pli ofte tikligas de logaj parfumoj virinaj; viajn orelojn vundas grincanj balgo-busoj kaj gorgaj konsonantoj... Dume viaj okuloj — ili finfine ricevas por tuta jaro porcion da ĉielbluo, sunflavo, marŝaŭm-blanko kaj da pala oro de domoj en Jerusalemo...

Kaj kion ricevas la cerbo? Tio ĉi forte dependas de vi mem. La gazetoj rakontos al vi, horon post horo, kion deciduloj fore transmaraj volas (ke la alia volu) fari pri kelkaj ĉi-lokaj megatunoj da malnova ŝtono — ŝtono tiom pli ol nura ŝtono. Libroj rakontos al vi, jarmilon post jarmilo, kion tiuj ŝtonoj estas vidintaj. Homo rakontos al vi, jaron post jaro, kiaj travivoj ilin ligas al tiu ĉi terpeco, ankoraŭ tiom fremde fora por la plejmulto el iliaj geavoj.


Spirite sata de ĉio sensita kaj sentita, vi revenas al la kongresejo. Kaj tie, post via tempovojaĝo tra unika lando, vi retrovas vian intiman spackapsulon, en kiu via verda familio vojaĝas ekstertempe, UK-post-UK-e, serĉe al planedo sur kiu alteriĝi.

István Ertl, el la kongresa kuriero Stel-Avivo

*baklavao = foli-kuko dens-siropa (Bulgara-Esp.-vortaro, 1981)



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia en-havo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enbavtabelo.



ANONCETOJ

KVINPETALO. Pro fuŝo ĉe la servilo bv. noti ke eknun la sola valida retadreso de la Kvinpetalo estas <kvinpetalo@esperanto.nu> kaj korekti la indikojn sur la paĝoj 86 kaj 161 de la Jarlibro.

KOMENCANTO — neordinare interesa internacia gazeto, pk 132, Ekaterinburg, 620041 Ruslando. Specimeno: 2 IRK.

KOMENCANTO serĉas lertan gvidanton por gramatika paĝo.

INDIĜENAJ DIALOGOJ serĉas tradukistojn, denaskajn en iu el la lingvoj angla, franca, hispana, rusa, kapablajn altnivele traduki tekston el Esperanto al unu el tiuj lingvoj kaj/aŭ inverse, por la TTT-ejo de la projekto (www.idnetwork.nl). Necesas ret-aliro kaj tekstoprilaborilo Word aŭ Word-simila. Kontakto Katalin Smidéliusz, smidik@fsd.bdtf.hu.


ALIANCO UNIVERSALA (Odos Eleonon 2001, Akroyali Avias, GR-24100 Kalamata, Grekio; ☎+30/721/58172; ✉+30/721/58035) serĉas kompetentan instruanton de Esperanto kaj talentan, idealistan voluntulon aŭ salajrulon, kapablan ekfunkciigi la centron per

grupaj agadoj kulturaj. Vidu <http://www.zyworld.com/retejo/alianco.htm>.

PATAGONIA E-RENKONTIĜO (12-15 okt.) bonvenigas ĉiujn esperantistojn kaj esperantemulojn ĉe la hotelo Los Notros (losnotrosb@infovia.com.ar) en Bariloche. Informoj: Rubén Sánchez, esperanto@neunet.com.ar.

KVIZO PER VIA HELPO: ŝatata programero de la 8-a Togolanda E-Kongreso (27-31 dec.) estos "Kvizo". Ni petas tiujn kiuj povas, disponigi al Unuiĝo Togolanda por Esperanto (Pk. 12096, Lomé; esp.togo@cafe.tg) esperantaĵojn taŭgajn kiel premioj.

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Aelita aŭ *La Marso formortanta* (1922). Aleksej Tolstoj (1882-1945). El la rusa trad. E. Pill. Nijnij Novgorod: Akileo, 2000 (2-a eld.). 141p. 20cm. "Fantasta romano" pri vojaĝo al Marso, en traduko el 1928. € 7,50.

Astronomia almanako 2000. A. Wandel, P. Lagrange k.a. Red. Alex Mikishev. Astronomia E-Klubo, 2000. 72p. 21cm. Artikoloj, tabeloj, kalendaroj; de enkonduka kurso por laikoj ĝis komentoj pri la evoluo de steloj. € 7,80.

Bibliografio de la verkaro de André Albault. Reinhard Haupenthal (1945). Schliengen: Iltis, 2000. 26p. ISBN 3 932807 14 6. 21cm. (Aperas ankaŭ en *De A al B.*) € 3,00.

De A al B. Fest-libro por la 75a naskiĝ-tago de D-ro André Albault. Editoris Irmaj kaj Reinhard Haupenthal. Schliengen: Iltis, 2000. 281p. ISBN 3 932807 09 X. 21cm. Dek ok studoj lingvaj kaj literaturaj, de M. Boulton, D. Broadribb, P. Daŝgupto, G. Mattos, G. Neves, H. Tonkin, J. Wells k.a. Kun bibliografio de Albault. € 48,00.

De tajgo al minaretoj. Aktoraĵo laŭ la taglibreto de Ada Sikorska-Fighiera. Jadwiga Gibczyńska (1924). Rotterdam: UEA, 2000. 18p. ISBN 92 9017 070 0. 21cm. Monodrama adaptado prezentita en la Adelajda UK (1997). € 3,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Esperanto en Ruslando. Historia skizo. Halina Gorecka (1959) kaj Aleksander Korjenkov (1958). Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 39p. 20cm. De 1887 ĝis 2000, "kun konsidero de la reala teritorio de la lando". Kun biografietoj de 42 ruslandaj E-aktivuloj. € 4,20.

Hejma vortaro. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: UEA, 2000. (Represo de la unua eldono el 1999.) 62p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Preskaŭ 600 nomoj de "ĉiutagaj aferoj" en Esperanto, kun difino kaj kun ekvivalentoj en 13 lingvoj. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Idilio (1891). *La Epoko: Kajero 143(3).* Iĉok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. T. Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 11p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondopatroj de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 3,30.

IFEH-historio. Kompletiga suplemento pri

Ĝoju ĉi-monate pedagogoj kaj filologoj... kaj legontoj de rusa romano!



la jaroj 1984-1999. Joachim Giessner (1913). Kiel: Esperanto-CD, 1999. 48p. ISBN 3 924409 03 X. 21cm. Pri Internacia Fervo-ista E-Federacio. € 0,90.

Inkotermoj 2000. Oficialaj IĈK-reguloj por la interpreto de komercaj kondiĉoj. El la angla trad. membroj de IKEF. Antverpeno: Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, 2000. 128p. ISBN 92 842 1199 9. 21cm. La mondvasse validaj reguloj de Internacia Ĉambro de Komercio pri kontraktoj. € 19,80.

Kongresa libro. 85-a Universala Kongreso de Esperanto. Tel-Avivo, 25 julio - 1 aŭgusto 2000. Red. Nikola Raŝić. Rotterdam: UEA, 2000. 104 p. 21cm. € 5,45. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Laŭdacio por d-ro André Albault okaze de la transdono de la fest-libro De A al B. Reinhard Haupenthal (1945). Schliengen: Iltis, 2000. 7p. ISBN 3 932807 12 X. 21cm. € 3,00.

Ludu kun ni! 2. Propedeŭtika lingvo-kurso por infanoj. Elisabetta Vilisics Formaggio (1934). Roma: "Esperanto"

Radikala Asocio, 2000. 128p. 30cm. Ilustris Anna Formaggio. Daŭriga lernolibro kun multaj bildoj, taskoj skribaj kaj desegnaj. Optimuma en la aĝo de 8-10 jaroj. € 18,90.

Malriĉa knabeto. *La Epoko: Kajero 143(9).* Vidu ĉe *Idilio*. 16p. € 3,90.

Mirinda sorĉisto de Oz, La (1900). L. Frank Baum (1856-1919). Ilustraĵoj de W. W. Denslow. El la angla trad. H. R. Dreyer. Berkeley: Bero, 2000. 145p. ISBN 1 882251 31 8. 21cm. Aventura vojaĝo de knabino Dorotea. Usona klasikaĵo de la infana mondliteraturo. € 15,00.

Mond-sav-plano. Fundamento de la Tutmonda Movado de Verd-Verdaj Paculoj. Gerard Cool (1921). Pazarĝik: Belloprint, 2000. 47p. 21cm. Kvazaŭ parto de la libro *Sava la savontino* (vidu jun., p. 119). € 3,00.

Musono. *Novelaro* (1963). Vimala Devi (ps. de Teresa de Almeida). El la portugala trad. Manuel de Seabra. Skövde: Alfab-et-o, 2000. 64p. ISBN 91 89432 01 0. 21cm. Noveloj de unika valoro dokumenta pri la malaperinta socio de Goao, eksa portugala kolonio en Barato. € 7,50.

Oblikve aŭ Mateno en la kelo. *La Epoko: Kajero 143(5).* Vidu ĉe *Idilio*. 19p. € 3,90.

Plena vortaro Esperanta-hebrea. Josef Murĵan (1920). Tel-Aviv: la aŭtoro, 2000. 170(numerita laŭ 340 kolumnoj)+8p. 25cm. La unua granda vortaro E-hebrea, kun ĉ. 10 000 kapvortoj. € 30,00.

Pri galgo. *La Epoko: Kajero 143(11).* Vidu ĉe *Idilio*. 8p. € 3,30.

Resurekto. Romano (1828-1910). El la rusa trad. Viktor Sapojnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 368p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Unu el la plej legataj verkoj de la rusa literaturo, kiu pentras panoraman socian bildon kaj kombinas romantikan intrigon kun la instruo ke malbonon venkas sole morala memperfektigo. € 24,00.

Sovaĝa besteto, La. *La Epoko: Kajero 143(6).* Vidu ĉe *Idilio*. 28p. € 3,60.

Unuaj libroj de Schleyer (1880) kaj de Zamenhof (1887), La. Pri la lanĉo de du planlingvoj. Reinhard Haupenthal (1945). Schliengen: Iltis, 2000. 20p. ISBN 3 932807 15 4. 21cm. (Aperas ankaŭ en *De A al B.*) € 3,00.

EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!
pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario





Fotoj: F. L. Veuthey

anoramo

1. Hotelo Dan Panorama bonvenigas la kongreson.
2. Gejunuloj promenas en la malnova Jafo.
3. HWANG Ung-sun dancas koree.
4. Theodor Levite kun Kep Enderby
5. La brazila grupo Nova Erao kantas kun francaj amikoj.
6. Uri Levite kun Simo Milojević
7. Ĉarma detalo el Jafo
8. Elanaj svingiĝoj de la Israela folklor-grupo Anahnu Kan
9. Forta suno ekster la kongresejo
10. Promeno en Masada
11. Clay Magalhães flosas en la Morta Maro.
12. Kongresa vartejo
13. Kep Enderby kaj Humphrey Tonkin
14. Vida Jerman, gratulata de Osmo Buller, Nikola Rašić kaj Moše Ben-Porat
15. Dorothy Enderby, Grégoire Maertens kaj Michela Lipari en la bankedo
16. Ans Bakker lingve peras inter nederlanda diplomatino kaj GBEGLO Koffi.

Ljudmila ARNAUDOVA (1939-2000), iama delegitino pri matematiko, kun-aŭtoro de *Amuza matematiko por geler-nantoj* (1984, 1992), aktiva en Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, forpasis la 4-an de junio en Pazarĝik (Bulgario).

André GAILLARD (1909-2000), UEA-membro ekde 1935, poste dumviva membro, ofta ano de Societo Zamenhof kaj Patrono de TEJO, mortis la 29-an de majo en Parizo.

Walter HUBE (1923-2000), direktoro de Internacia E-Muzeo Vieno inter 1965 kaj 1985, kie li laboris de 1958, forpasis la 2-an de marto en Vieno.



La Revuo Orienta

Karl MAIER (1901-2000), membro de UEA pli ol 50 jarojn, forpasis la 25-an de julio en Berlino, kie li estis la plej altaĝa e-isto. (En la Berlina UK li ankoraŭ ekstare akceptis la aplaudon

de la publiko.) Lerninte E-on en 1924, post elmigro el Germanio en 1930 li restadis, kun oftaj E-kontaktoj, en Usono, Meksiko kaj Japanio. Inter 1935 kaj 1955 li vivis en Ĉinio. Reveninte al Orienta Germanio, li kunigis tie esperantistojn per sia varbado de 300 abonantoj por *El Popola Ĉinio*, impulsis la regulajn E-kunvenojn en Orienta Berlino (de 1960) kaj batalis por la laŭleĝigo (1961) de Esperanto en GDR.

Leopoldo KNOEDT (1921-2000), Honora Membro de UEA, delegito pri tradukado kaj vortaroj, membro (1986-95) de la Akademio de Esperanto, forpasis la 25-an de julio en Lauro de Freitas (Brazilo).

Knoedt lernis Esperanton en 1955, tuj aliĝis al UEA, kaj baldaŭ poste ekinstruis la lingvon universitate. Lian unuan libroforman esperantigon (*Elektitaj poemoj* de Castro Alves, 1959) sekvis tuta aro da tradukoj, precipe el la portugala, i.a. *Sonetoj de l' nokto* de Cruz e Sousa (1993), *Sordine* de M. Ramos (1995), la romanoj *Vivoj sekaj* de G. Ramos (1997) kaj *La horo kaj la vico* de Aŭgusto Matraga de J.



Arkivo de UEA

Guimarães (1997), sed ankaŭ el la angla, ekz. *La balado de Prizono Reding* de O. Wilde (1993) aŭ *La korvo* de Edgar Allan Poe, premiita en Belartaj Konkursoj, kiun li mem deklamis kasede (1981). Plej elstare, al li ni ŝuldas esperantigon de la gradioza portugala epopeo,

La Luzidoj de Camões (1980). *La infana raso* de W. Auld aperis en lia portugalingo (1992). Por la eduka kampo, li adaptis la Zagreban Metodon al la portugala (*Aprinda Esperanto*, 1993).

Pluraj verkoj kaj tradukoj de Leopoldo Knoedt atendas eldonon, i.a. *Amazonia urno*.

César MOSTEYRÍN Y CASTILLO (1912-2000), dumviva membro, delegito en Segovia (Hispanio), mortis la 7-an de julio.

Agostinho RIGHI (1926-2000), instruanto, prezidinto de la Bolonja grupo A. Tellini, forpasis la 16-an de januaro.



Komplezo de Petro Chrdle

Vladimír VÁŇA (1932-2000), iama delegito pri ekonomio kaj filatelo, mortis la 25-an de marto en Plzeň (Ĉeĥio). Unu el la plej bonaj e-istaj filatelistoj en la mondo, li verkis katalogojn kaj fakajn artikolojn, kaj li gajnis oran medalon ĉe internacia filatela ekspozicio nur du semajnojn antaŭ sia morto. Beletre, li verkis rakontojn premiatajn en Belartaj Konkursoj kaj precipe tradukis, i.a. la romanon *Romeo, Julieta kaj la tenebro* de Jan Otčenášek (1965) kaj, eldonotan, la kompletan *Švejk* de Hašek.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ✉ keponderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen

55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ✉ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ✉ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎ +36/23/364-198, ✉ Stefan.MacGill@galamb.net.

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.
Heidi Suonuuti. El la angla trad. Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3. 21cm. Prezo: €5,40. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.



Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: €8,15. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



VIZITU VIAN PROPRIAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 25-an de novembro 2000 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gastoj:
SPOMENKA
ŠTIMEC




- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



POR SUKCESI EN EKZAMENO

internaciaj ekzamenoj




de ilei/uea

Guidilo al la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj. Dua eldono. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998. 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21cm. Prezo: €3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.


GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesco pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO



Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj

ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉef-segnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: € 9,90.

VORTARO DE HEJMA ESPERANTO

Parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme, ofte ne trovas en ordinaraj vortaroj nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago. *Hejma vortaro* helpas al ili. Ĝi proponas Esperantajn nomojn por diversaj ĉiutagaj aferoj. La Esperantaj kapvortoj estas re-koneblaj per difino, kiun sekvas traduko en dek tri lingvoj:


angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda. La materialon kolektis la anoj de la komputil-reta diskutejo DENASK-L kaj Rondo Familia.



HEJMA VORTARO. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2000 (reprezo de la unua eldono). 63p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Prezo: € 7,50.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: € 10,80.
Sonkasedo: € 5,45. Triona rabato ekde 3 ekz.

UNIKE VASTA PANORAMO



Unike vasta panoramo al la dilemoj de la nuntempa mondo. Aperigante tiujn ĉi referaĵojn en Esperanto UEA demonstris sian ligitcon al la streboj de Unesko pri kulturo kaj prezentis al E-parolantoj legaĵojn kiuj helpas meti la strebojn kaj celaron de la E-movado en pli vastan kuntekston. (Vilmos Benczik, *Esperanto* 1999:12)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. Trad. Johano Rapley. 1998. 60p. ISBN 92 9017 59 X. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ SANO. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. € 5,40.

Triona rabato por samtempa aĉeto de ĉiuj tri libretoj aŭ de 3 ekz. de sama libreto. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.